

# LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 12.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —  
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso  
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

## AL LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTARO!

Per subskribo de l' packontraktoj finiĝis definitive la mondmilito. Humaneco kaj kulturo devos nun malaperigi la profunde gravuritajn signojn de l' mizero, sufero eĉ de la brutaleco, kiujn postlasis la nemorala milito. Ĉio bona kaj bela devas kuniĝi kaj streĉi ĉiujn fortojn por renovigi la mondordon kaj la malprogresintan konscion de l' honoro kaj justeco, eĉ por suprenlevi la piedpremitan idealon de l' tuthomaraj penadoj.

Nur en la laboro kaj scio estas nia savo! Tiu ĉi nobla devizo devas esti fiksita en korojn de ĉiuj membroj de la homa socio, kaj ĉefe ni, Bohemoj kaj Slovakoj — la nacio jetita en la mizeron, kaŭzitan per malbenita regadavidemo de niaj subpremantoj — devas esti portantoj kaj defendantoj de tiu devizo. Jen devas helpi ĉiu fidela filo de la nacio. Eĉ ni ĉeĥoslovakaj esperantistoj konas niajn devojn kaj certe ni volas ilin plenumi.

Unueco estas la bazo de ĉiu penado kaj la unueco fariĝis morala devo de nia epoko. Tial ankaŭ morala devo de ĉiu bohema kaj slovaka esperantisto estas labori por konstruo kaj fortigo de nia komuna centro, kiu estas »Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista«, kreita post interkonsento de la reprezentantoj de iamaj asocioj »Bohema Unio Esperantista«, »Bohema Asocio Esperantista«, »Laborista Asocio Esperantista« kaj de la reprezentantoj de ĉefaj bohemaj societoj esp., kiuj laŭ decido de la Konferenco de bohem. Esperantistoj (9. dec. 1917) formis la »Komunan Komitaton de Boh. Esperantistoj«.

La nove fondita asocio, kies statutoj estis jam prezentitaj al la leĝa aprobo, estos

## ĈESKOSLOVENSKÝM ESPERANTISTŮM!

Podpisem mírových smluv skončila definitivně světová válka. Humanita a kultura mají teď zahladit hluboce vyryté stopy bídy, utrpení i surovosti, které zanechala nemravná válka. Vše dobré a krásné musí se spojit a napnouti všechny síly k obnově světového pořádku a pokleslého smyslu pro čest a spravedlnost i k pozdvižení podupaného ideálu snah všelidských.

Jen v práci a vědění jest naše spasení! Toto vznešené heslo musí býti vštípeno v srdce všech členů lidské společnosti a hlavně my, Čechové a Slováci — jako národ uvržený v bídu, způsobenou kletou vládyčtivostí našich utlačovatelů — musíme býti nositeli a zastánci tohoto hesla. Zde musí přispěti každý věrný syn národa. I my, českoslovenští esperantisté, jsme si vědomi svých povinností a zajisté je plníti chceme.

Jednotnost jest podkladem každého snažení a jednotnost stala se mravním příkazem naší doby. Proto i mravním příkazem každého českého a slovenského esperantisty jest, pracovati k vybudování a posílení našeho společného centra, jímž je »Československý svaz esperantistů«, vytvořený po vzájemné dohodě zástupců bývalých svazů »Bohema Unio Esperantista«, »Bohema Asocio Esperantista«, »Dělnického sdružení esperantského« a zástupců předních českých spolků esperantských, kteří dle rozhodnutí konference českých esp. (9. pros. 1917) utvořili »Společný výbor českých esperantistů«.

Nově založený svaz, jehož stanovy byly již předloženy k úřednímu schválení, bu-

la ĉefa organizanto de la ĉeĥoslovaka movado esperantista, subtenanto de ĉiuj penoj celantaj al disvastigo de la movado kaj informanto de fremdlando pri la vivo en nia patrujo. Unu el la ĉefaj taskoj de la asocio ankaŭ estas zorgi pri efektiviĝo de la XIII. Tutmonda Kongreso de Esperanto en la venonta jaro en Praha.

La konstituanta ĝenerala kunveno de la asocio okazos en plej proksima tempo en Praha. Partoprenu ĝin ĉiuj, al kiuj la ebleco tion permesas kaj zorgu, ke ĉiuj bohemiaj kaj slovakaj esperantistoj fariĝu membroj de sia centra asocio!

La Komuna Komitato de Bohemaj Esperantistoj: Gimn. dir. Jos. Eiselt, Prof. Rud. Fridrich, Rud. Hromada, Prof. Dr. Stan. Kamaryt, Jos. Pech, Aug. Pitlik, Kar. Procházka, Mil. Schmidt, Julie Šupichová, Bed. Tittl.

de ĉefo de la ĉeĥoslovaka movado esperantista, subtenanto de ĉiuj penoj celantaj al disvastigo de la movado kaj informanto de fremdlando pri la vivo en nia patrujo. Unu el la ĉefaj taskoj de la asocio ankaŭ estas zorgi pri efektiviĝo de la XIII. Tutmonda Kongreso de Esperanto en la venonta jaro en Praha.

Ustavující valná hromada svazu bude se konati v nejbližších dnech v Praze. Destavte se všichni, jimž možnost dovoluje, a působte k tomu, aby všichni čeští a slovenští esperantisté se stali členy svého ústředního svazu.

Společný výbor českých esperantistů: Řed. gymn. Jos. Eiselt, prof. Rud. Fridrich, Rudolf Hromada, prof. dr. Stan. Kamaryt, Josef Pech, Aug. Pitlik, Karel Procházka, Mil. Schmidt, Julie Šupichová, Bed. Tittl.

## LITERATURO

L. Vosyková:

### INFANA AMUZO.

El lerneĵ' kuras amas' da infanoj;  
tuj blankan neĝon tenas en la manoj —  
neĝbuloj pretoj estos en momento,  
kaj ili certe flugos kiel vento.  
Batal' komencas — amuzo ilia,  
neĝbulo flugas, poste dua, tria.

Kiel la hajlo ili dorson batas,  
ĉion eksstermas kaj nenion ŝatas.  
Infanoj, sur la lipoj kun ĝojvoko,  
staras en vic' sur difinita loko,  
rivalon detruante senrespire,  
kaj atendante venkadon sopire.

Krepusk' vualas jam la tutan valon,  
en kiu knaboj finas la batalon,  
kaj venke vokas la infana lango;  
kun ruĝa rozo sur diketa vango  
ĉiu al sia najbar' premas manojn,  
kaj disiras en proksimajn kabanajn.

ooo

### MI DEZIRUS FARIĜI...

Bildeto el Slovakio.

Ĉeĥe skribis Gabriela Preissová.

Tri etaj dratumistoj ĵus ellernintaj mecion,\* knaboj similaj unu al alia kiel ovoj,

\*) La viraj loĝantoj de la montara parto de Slovakio estas devigataj, pro mizero tie reganta, jam de sia junaĝo perlabori por si vivri-

per sia staturo, sia vesto preskaŭ nova sia melankolia kaj tamen konfida rigardo, piedirante el komitato Trenčín tra Moravio ien malproksimegen en fremdlandon, komforte eksidis je tre malfrua horo dum junia vesperkrepusko sub arka fervojponto por pasigi nokton.

»Kiom agrable estas tie ĉi, preskaŭ tiel bone kiel en ĉambro,« esprimis unu el junaj pilgrimantoj per voĉo atestanta dankemon kaj kontenton.

Li diris tiujn ĉi vortojn levinte kelkajn spiketojn de pigmeeca sekalo, kiujn la vento estis ĵetinta tien ĉi el la apuda kampo kaj esplorinte per sia rigardo la maldensan herbon, la etajn ŝtonojn sur tero, poste la grizan kaj de musko kovritan arkafon, kaj fine la siluetojn de picea arbaro, kiu estis por tiel diri kvazaŭ muro al arko de viadukto.

»La luno ne trapenetros tien ĉi,« diris la alia, li tamen ne ĉesis rigardi la plenlunon, kvazaŭ li estus volonta ĝin altiri en ombron apud li.

»Jezueto, nia Sinjoro, estu laŭdata,« eksopiris la tria. Li etendiĝis sur teron, metis la kapon sur siajn pendsaketon kaj kunmetitan burnuson kaj ekdormis tuj.

La du aliaj preĝis ankoraŭ pie pri gepatroj, pri avo kaj avino, pri mortintoj kaj vivantoj, pri baptopatroj kaj baptopatrinaj, pri bona vojaĝo, pri sukceso kaj

medojn en alioj landoj. Tre ofte ili tion faras riparante disbatitajn potojn kaj vendante diversajn objektojn el drato. — (Rim. de la red.)

tiel laŭvice pri ĉio, pri kio oni devas preĝi, kiel iliaj patrinetoj estis instruintaj kaj rekomendintaj, ke ili preĝu, precipe dum vojaĝo en fremdlando. La kamarado venkita per dormo estis devigata preĝi dufoje la sekvantan tagon por kompensi tion kion li forgesis.

Georgo poste ekparolis:

«En tiu ĉi momento mia patrineto kaj nia malgranda Jozefĉjo ankaŭ dormas. Ni ne devas forgesi estontan dimanĉon skribigi longajn leterojn al niaj familioj. Eble estos iu afabla kaj skribos ĉion, se ni petos lin. En fremdlando troviĝas bonkoraj homoj.

«Ni estas tre malproksime de nia hejmo,» ekparolis Dobiŝ, tiu, kiu ne povis satigi rigardante la plenlunon — li ne povis sin deteni kaj eliris por momento por vidi, kio rimarkinda estis en ĉirkaŭaĵo.

Sur la tero oni aŭdas misteran brueton, kvazaŭ oni flustrus fabelojn unu post la alia . . . Bedaŭrinde Dobiŝ ne komprenas ilin, aŭskultante ilin li larĝigas bruston kaj lia kapo plipeziĝas . . . Venas al li ankaŭ la ideo, ke la stoploj de herbo moviĝas nur kiam li ne rigardos ilin. Super li la ĉielo profunda kaj semita de brilantoj volbiĝas arkforme; ĝuste apud la hungaria montaro ĝi malaltiĝas ĝis tero kvazaŭ pro mizerikordo. Sendube la mondo tie hejme en Trenĉin estas la plej bela. «Nur la mono ne kreskas tie,» diradis ridetante la najbaro Perko, «tial ni devas eliri en ĉiujn partojn de la mondo por amasi ĝin.»

«Kiom stranga estas la mondo,» pensas la knabo, «mi volus scii, kie estas la ĉiela pordego — el kie oni ĝin atingas . . .»

Dum li solvas tiun ĉi malfacilan problemon, bruo estis aŭdebla el malproksimo kvazaŭ neĉesanta subtera rulado, kiu proksimiĝis pli kaj pli.

La malgranda dratumisto elrampis iom pli alten sur la deklivo; sciante, ke estas malpermesite surpaŝi la relojn (la gardisto kaptis kaj punis tuj) li klinis sian kapon al ili.

«Ha,» li diris, ekvidinte du grandajn okulojn ĵetantaj flavan lumon sur la malhelan vojon, «maŝino venas! He! kamaradoj! Venu kaj rigardu iom!» li kriis al siaj kunuloj malsuprenirinte kun ĝoja sento, kiu lin senigis de lia melankolio.

Nur Georgo eliris (la tria kamarado kaŭzis ĉiam grandan malagrablaĵon al ili, ĉar

li estis konstante dormema, apatia kaj malsprita kiel trunko, tiel ke oni devis tiri kaj puŝi lin sur la vojoj) saltante li proksimiĝis al Dobiŝ kaj ambaŭ atendis la vagonaron kun batanta koro kaj fiksitaj okuloj.

La maŝino ekfajfis intense kaj fiere kaj ruliĝis sur la deklivo kiel demono; ĝiaj lumoj disiĝas por momento en strietoj, ili ektuŝetis la deklivojn, la arbareton kaj la kampojn kiel fulmo — kaj jen — jam ili malaperas.

«Mi volus fariĝi veturigisto, kiu estas sur la antaŭo de la maŝino, kaj trakuri la mondon — tio estus alia vivo — jen kion mi dezirus!» fantaziis la eta dratumisto Dobiŝ, kiam ambaŭ revante kaj kvazaŭ entuziasmite per la grava sperto revenis sub la ponton.

«Hm» — aŭdiĝis la alia nomita Georgo eksidante sur la malnova burnuso, kiun li estis heredinta de sia onklo kaj kiun li ĉien trenadis kune uzante ĝin kiel kapkusenon aŭ kiel mantelon — li envolvas sin en ĝin, kiam pluvas, por konservi la alian burnuson preskaŭ novan — kaj li klarigas palpebrumante: «Mi, mi scias ion pli bonan! Hodiaŭ mi observis la kavalerianon, kiu ekaperis subite sur la vojo sur ĉevalo bela kiel birdo. La maŝino havas nur sian determinitan vojon, sed la soldato en sia multkolora uniformo promenas, kie li volas. Ho ve, Sinjoro Jezuo — mi volus tutkore fariĝi kavaleriano, kiel jena, kiun mi vidis.»

«Kaj Vi, Johanĉjo, kion Vi deziras?» demandis Dobiŝ skuante pro petolemo la korpon de dormemulo. He, diru al ni, kion Vi dezirus?»

«Nu,» respondas tiu ĉi post longa sopirado murmurante — «mi dezirus reiri hejmen . . .»

Eĉ en sonĝo ĉiu tiel persistis je sia preferata deziro kaj daŭrigis konstruante sian fantasma paradizon.

Kaj jen kiel la realeco efektivigis iliajn revojn.

Dobiŝ estas jam plenaĝa homo kun vizaĝo sulkiĝinta, dratumisto spertplena — li tamen ankoraŭ neniam dum sia vivo veturis fervoje. Saĝa homo ja ne elspozos diboĉe sian ŝparitan monon pro tento, se li posedas fortajn krurojn, kaj precipe kiam la monarko konstruigis tiom da komfortaj ŝoseoj . . .

Georgo por sia ĉagreno kaj por pleniĝi la seniluziigon estis rekrutigita al infanterio, faris nenian vojaĝon dum sia servado laŭ propra volo kaj ĝisvivis nenion agrablan.

Kaj la dormema apatia Janoĉjo, kiu portis pasian nostalgion en sia animo kuntirinta sin sur ĝin mem — tiu malfeliĉulo ekmalŝanis en fremdlando kaj ne revenis jam hejmen.

Tradukis Rudolf Fridrich.

## ESPERANTISMO

### XII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hago, 8.—15. aŭgusto 1920.

Al la tutmonda samideanaro!

Post interkorespondado kun la Konstanta Komitato de la kongresoj, la Hagaj Esperantistaj societoj decidis akcepti la inviton, okazigi la XII. Univ. Kongreson de Esperanto en nia registara urbo s-Gravenhage (esp. Hago) dum la somero 1920.

Kompreneble ni ĉiuj interkonsentas, ke la ĝenerala spirito de la unua postmilita esp. kongreso (preparata en ne longa tempo) ne estos simila al tiu de niaj antaŭaj grandiozaj kongresoj. Sed kiu venos Hagon por antaŭ ĉio viziti laborantan kongreson celantan la restarigon de niaj internaciaj rilatoj kaj la reorganizon de nia movado, tiu certe ne bedaŭros sian vojaĝon.

Sabaton 15. novembro konstituigis nia loka kongres-komitato: ĉiuj kvar Hagaj societoj harmonie kunlaboros. Membroj de la komitato estas jenaj samidanoj: S-ro J. R. Isbrücker, prezidanto, Hoogeweg 68, Watergraafmeer apud Amsterdam, kiu komence de 1920 ekloĝos kun sia edzino en Hago, S-ro J. L. Bruijn, sekretario-kasisto, Paul Krugerlaan, 37, Haago (por rekomenditaĵoj aldonu ĉe la adreso: Poŝtkontoro de la Reykade), F-ino. N. Bonn, S-ino. J. C. Isbrücker-Dirksen, S-roj. W. A. Kaupé kaj H. C. Mees, ĉiuj membroj de »Fine ĝi venkos«, S-roj. H. Laarhoven kaj Marreevee, membroj de Romankatolika esp. societo, S-roj. F. J. Visser, J. H. Visser, kaj M. P. de Wilde, membroj de tramista klubo »Ĉiam Antaŭen, S-roj. H. Kratz kaj L. van Munster, membroj de Ĝenerala Haga Laborista Esp. Klubo. La prezidanto kaj sekretario eksidus en la Konstanta Komitato de la Kongreso.

Diversaj subkomitatoj por enloĝigo, ekskursoj, ktp. estos formataj.

Al la K. K. K. estas submetataj por aprobo jenaj decidoj:

1. okazigi la kongreson en la 1. semajno de septembro 1920.
2. fiksi la kongreskotizojn je 10 Nederlاندaj guldenoj;
3. permesi, ke samideanoj el landoj kun malfavora monkurzo (ekz. Germanujo, Aŭ-

strujo, Francujo, Belgujo, ĉiuj novaj Eŭropaj ŝtatoj k. c.) pagu sian kotizojn en majo 1920, kiam supozeble la malaltaj kurzoj almenaŭ iom plibonigos;

4. formi garantian fondon per enskriboj de sumoj po 25 guldenoj.

#### Karaj Gesamideanoj,

jen la unuaj komunikoj pri la dek-dua. Depost kiam vi estos legintaj ilin, eklaboru por nia kongreso, ke ĝi fariĝu sukceso. Ni kalkulas je almenaŭ 400 kongresanoj diversnaciaj, kaj samideanoj el Anglujo, Svisujo, Hispanujo, Skandinavio kaj Nord-Ameriko sendu jam nun kotizojn (mondonacon ni ankaŭ ne malŝatos!) por faciligi al ni la preparadon de la kongreso. Mensejndojn oni faru rekte al la »Residentiebank« en Hago (ne al la kasistoj, kiu malfiernis kongreskonton.

Kun samideanaj salutoj

J. L. Bruijn,

Sekretario de l'Loka Kongreskomitato

#### Dua Komunikoj.

**Kongressemajno.** — La loka komitato, ricevinte multajn plendojn pri la maloportuno de la unue elektita semajno (unua semajno de septembro), pro kio multaj samideanoj el la publika instrua mondo ne povus partopreni en la kongreso, decidis ŝanĝi la datojn en 8.—15. aŭgusto. Ĉi ne decidis tion facilanime ĉar la laboroj de la enloĝiga komisiono fariĝis multe pli pezaj, pro tio, ke en julio kaj aŭgusto, la vakanco-monatoj, Hago enloĝigis multajn gastojn.

**Kongresejo.** — Mi ĵus ricevis la ĝojigan komunikon de la koncernata ministro, ke li cedos al ni, por la grandaj kongreskunvenoj, la plej malnovan kaj historian salonegon el Hago, nome la »Ridderzaal« (Salonego de l'Kavaliroj), sub kelkaj plenumotaj kondiĉoj. Precipe de niaj eksterlandaj amikoj venis la instigo klopodi por akiri la Palacon, duavice la Salonegon de l'Kavaliroj. Ĉar la estraro de la Carnegie-fondaĵo, kiu administras la Palacon, ne cedas la palacon por aliaj celoj ol por la oficialaj packongresoj, nia tuta espero estis je la Salonego de l'Kavaliroj.

**Honora Komitato.** — Ĝis nun ni sukcesis varbi por nia honora komitato la jenajn konatajn personojn:

S-ino S. van Rees-Broese van Groenou.

S-ino E. J. Wijnaendts Francken-Dijserinck.

S-ro Mr. J. Patijn, urbestro, kiu fariĝos honora prezidanto.

S-ro Mr. Mr. J. B. Bomans, Roman-Katolika parlamentano, skabeno en Haarlem.

S-ro W. K. Brevet, Direktoro de la Residentiebank.

S-ro Prof. D-ro D. van Embden, liberala demokrata senatano, prof. de sociologio kaj statistiko ĉe la Amsterdama Universitato.

S-ro D-ro H. E. van Gelder, Urba arkivestro.

S-ro Prof. D-ro A. F. Holleman, profesoro de kemio ĉe la Universitato de Amsterdam.

S-ro H. van Kol, Socialdemokrata senatano.

S-ro H. Koppel Jr., Eks-prezidanto de la Haga Komerca Cambro.

S-ro H. Ch. G. J. van der Mandere, pacifista ĵurnalisto kaj literaturisto.

S-ro F. J. van Paasschen, Direktoro-Cefredaktoro de la ĉiutaga gazeto »De Avondpost«.

S-ro D-ro F. E. Posthuma, Eks-Ministro de Agrikulturo, Industrio kaj Komerco, Direktoro de la mutuala kooperativa laborista societo »Centraal Beheer«.

S-ro Mr. D-ro H. J. Romeijn, Eks-skabeno.

S-ro D-ro J. Schoemaker, Kirurgo ĉe la Urba Malsanulejo.

S-ro Mr. J. M. van Stipriaan Luiscius, advokato kaj prokuroro, aŭtoro de »Karakter«. S-ro Nico van Suchtelen, verkisto.

S-ro Justus Tal, Superrabeno en Utrecht.

**Financoj.** — Komprenable la tempo inter la apero de la unua kongreskomuniko kaj la forsendo de la dua estis tro mallonga por povi esperi gravajn rezultojn. Kelkaj Nederlandaj samideanoj jam sendis siajn kotizojn, faris mondonacojn aŭ enskribis por la garantia fundo (enskriboj akceptataj po 25 guldenoj).

Mi esperas, ke la eksterlandaj samideanoj komencos de nun sendi siajn kotizojn, event. mondonacojn, kun klarigo al la Residentie-bank. Enskriboj por la garantia fundo adresataj nur al la sekretario-kasisto.

La kongressekretario:

**J. L. Bruljn.**

## NACIA VIVO

F. J. HAVELKA:

### JUSTECO.

Antaŭ ne longe aperis en Bohemia libro titolita »Vzpomínky z vyhnání«, kie nia samideano prof. F. J. Havelka priskribas siajn dumilitajn travivaĵojn sub la protektanta flugilo de aŭstria dukapa aglo — en diversaj malliberejoj kaj t. n. internigaj stacioj, kie en societo de frenezuloj, idiotoj, sifilisuloj kaj similaj malsanuloj, ŝtelistoj eĉ mortigistoj li restadis de 12. dec. 1914. ĝis 10. nov. 1916. kiam fine militista eskorto forkondukis lin, kaj kune kun li eĉ aliajn internigitojn, por batali »je reĝo kaj patrujo«. Kaj tie, sur plej malalta ŝtupo de la homa mizero li kunvenis kun multegaj inteligentuloj ne nur bohemiaj, sed eĉ kun aliaj, kiuj apartenis al negermanaj kaj nemagiaraj nacioj de la monarkio.

Aŭstrio dum la milito enkatenigis ĉiun, kiu ne ŝajnis esti sufiĉe lojala al ĝia furiozado. Kompatindaj estis la personoj nur iom publike konataj, se aperis suspekto, ke iliaj pensoj sekvas propran direkton ne atentante la oficialajn ordonojn de aŭstria gvidantoj! Ili senkonpate estis malliberigitaj kaj

la aŭstria Justeco komencis serĉi paraĝrafojn, kiujn oni povus uzi kontraŭ la kulpulo. Kaj se eĉ la paraĝrafoj ne lasis sin fleksi, tiam helpis internigaj stacioj, kie la suspektataj personoj »danĝeraj al la ŝtato kaj al sukcesa finigo de la milito« estis garditaj.

La libro de Havelka prezentas martiran dummilitan vivon de multaj diversnaciaj inteligentuloj en la internigaj stacioj kaj legante ĝin, vi ankoraŭ nun, post la disfalo de perfortema sistemo, tremas pro teruro. La tre leginda verko de samideano Havelka estas skribita en formo de taglibro kaj ni represas el ĝi kelkajn eliraĵojn:

12./IV. Grave malsana Dalmaciano Ilija Deniĉ frenezigiĝis. Posttagmeze oni lin forveturigis en hospitalon en Oberhollabrunn. Laŭdire li estis ĉe sia arestigo terure batita de la ĝendarmoj kaj oni dubas pri lia vivo. Unu el Dalmacianoj rakontis al ni: Lazar Tarana estis malliberigita en Dubrovnik kaj oni postulis de li subskribi la protokolon kun la atesto, ke Cingria, Ivo Vojnoviĉ kaj aliaj ribeligis kontraŭ la aŭstria registaro kaj penis subteni la serban. Por tio oni promesis al li 50.000 K kaj liberan foriron en Italujon aŭ en Svisujon. La monon oni donos al li post lia forveturo. — La samon oni promesis al Mitar Goroviĉ el Dubrovnik. Oni direktis revolveron kontraŭ liajn okulojn dirante: vi subskribos aŭ ni vin mortpafos. Vi havas horon da tempo por pripensi. Poste oni diris: jam nur  $\frac{3}{4}$  h. —  $\frac{1}{2}$  h.

— 10 minutojn, 8, 6, 4, — 1 minuton, kiam li ne subskribis, li estis internigita. Eĉ ne unu el tiel turmentitaj Serboj lasis sin delogi. — Serbo Petar Krnits, sanit. ĉefleut. el Zagreb rakontis, ke kiam la 4. brigado marŝis post la 2. kaj 3. brigado, ĝi trovis ĉie vilaĝojn malplenaj, senhomaj, ĉiuj viroj pli ol 12 jaroj estis sur arboj pendigitaj kaj virinoj eĉ infanoj trapikitaj. De Sarajevo ĝis Valjevo estis videbla eĉ ne unu vivanta estaĵo.

28./IV. Sinjorino Gerovská en negardita momento volis pendigi sed aliaj sinjorinoj malhelpis ŝin.

26./VI. Revenis Weinhold, kulpigita laŭ § 64. De la distrikta juĝejo en Těšín (Teschen) li estis liberigita. Li alportis sciigon, ke ĉiuj 16 membrinoj de la Ruĝa Kruco en Mor. Ostrava (Mähr. Ostrau) estas grave-daj aŭ malsanaj pro sifiliso. Inter ili estas 14 $\frac{1}{2}$  jara knabino.

30./VI. Ort sendis hieraŭ telegramon al sia edzino, sed oni redonis ĝin al li kun la rimarko ke oni ne akceptas bohemiajn tele-

gramojn. Por si mem aldonis »Stellvertreter«, ke post la milito oni oficos en Aŭstrio nur germanlingve.

Fraŭlino Gerovská (Polino), diris al mi la jenon: Mi estis kun mia patrino arestita en Czernowitz pro la suspekto, ke ni helpis al miaj du fratotoj forkuri en Rusion. Post kvinsemajna malliberigo mi estis liberlasita kontraŭ kaŭcio da 10.000 K. Mia patrino estis dum naŭ semajnoj ĉe la juĝejo kaj poste oni transdonis ŝin al la polico, sed mi dume estis denove arestita kaj kune kun la patrino sendita en Lwów kaj poste en Kraków kaj Innsbruck, kie ni estis konfinitaj. La 10 sept. ni estis donitaj en polican malliberejon. Tio daŭris ses semajnojn. Ni estis 8—9—13 personoj, ŝtelistinoj, prostituistinoj k. a. en malgranda ĉambro, kie estis nur ses litoj. Kiam oni elkondukis nin eksteren, la preterpasantoj kriadis je ni: »Verräter«, »Hochverräter«, »Bande« k. t. p. La patrino malsaniĝis kaj oni forveturigis nin al Gellersdorf (Malsupra Aŭstrio). Tie oni donis nin en malgrandan ĉambron. En la pordo estis malgranda rondoforma fenestreto tra kiu oni nin tage eĉ nokte observis. Gardisto Makowetz, ofte ebria kaj aliaj gardistoj, eĉ la komisario venadis en malfrua vespero eĉ nokte en nian ĉambron. La duan tagon iu turnis la rondan metalan kovrilon de la fenestro, rapide kaj denove malrapide, kaj ĝi terure knaris. Eĉ nokte ĝi ne ĉesis, kaj tial ĝi terure efikis je niaj nervoj. La duan tagon plendis mia patrino al la komisario, kiu respondis ke ĝi estis ia malatento. Tamen la knarado ripetigis tage eĉ nokte. Tutajn noktojn ni ne dormis. Kaj la komisario venadis demandi kiel ni dormis... Ni estis proksimaj al freneziĝo. La knarado ĉesis, ĝis kiam mia patrino grave malsaniĝis.

La librovendisto Zelinka al mi rakontis: Ĝi estis la 9./IX. 1914. je la 11. nokte, kiam vekis min. dr. Jankú, polica komisario, akompanata de 3 detektivoj kaj 6 ĝendarmoj. Ili renversis mian tutan loĝejon kaj forveturigis min en policejon en Mor. Ostrava, kie la komisario diris al la ĉeestanta leŭtnanto: »Den Vogel haben wir schon. Einen guten Fang haben wir gemacht!« (La birdon ni jam havas. Bonan kaptaĵon ni faris!) La dekan tagon post mia arestigo oni transveturigis min al Kraków, al militista juĝejo, kie ĵus estis ekzekuto, kiu faris al mi teruran impreson. Poste oni forkondukis nin en malliberejon sub kastelo Wawel. Survoje insultis nin oficiroj eĉ popolo per plej abomenaj vortoj, ili kraĉis je ni k. s. En malgranda kamero en 1. etaĝo ni estis lasitaj. Oni volis »ŝtopi« tien 25 personojn, sed kiam ni donis al gardisto po unu krono, li lasis tie 13 inteligentulojn.

Inter ni estis: 1 juĝisto, 1 kuracisto, 2 profesoroj, 2 baronoj ktp. Kiam ni volis esti sur la korto, ni devis havi monujon senĉese en la mano: La gardistoj devis ricevi 1—2 kronojn, alie ili volis fermi nin en la ĉelojn. Kiam ili ricevis la monon ili diradis: »Pan dobrodziej moje zostać na wolności.« Por ĉiu komplezo, ekz. alporto de manĝoj, la gardistoj devis ricevi monon, alie ili lasis nin atendi aŭ nin maldelikate kalumniis. — — — El Kraków ni veturis tra Vieno al Walpersdorf. En Viena stacidomo atakis nin iu societaĉo, kiu kalumniis nin kaj ĵetis sin kun tranĉiloj en la manoj kontraŭ ni. Inter ĝi estis eĉ du fervojistoj! — — — En Walpersdorf ni restis tri tagojn kaj ni denove estis preparitaj por forveturo. En la stacidomon venis publiko, kiu denove tiel trovis okazon por nia atakado kaj kalumniado. Dumvoje ni ne ricevis eĉ akvon. Ni estis ŝtopitaj en vagonoj por brutaro. Neniu povis iri en necesejon. Kaŭze de tio malsaniĝis dr. Maliňak, rusa pastro. La duan tagon ni venis en Thallerhoff —on, kie li tuj prezentis sin al kuracisto, sed estis malfrue. Post kvinmonata malsano li mortis. En Thallerhoff oni donis nin en malnovan garbejon, kie ni kunpremitaj kvazaŭ haringoj dormis sur nuda planko, sen kovriloj, kvankam la frostoj estis fortaj. Viro kaj virinoj, inteligentuloj eĉ analfabetoj, malpuraj kampuloj el Karpaty, ĉio kune, kaj baldaŭ vastiĝis pedikoj. La necesejoj estis komunaj kaj tre primitivaj, tiel, ke la junularo dum tago havis spektaklon. La sinjorinoj kutime iris je necesejo nur vespere, la hontemo tion al ili ne permesis en tago. — — Oni donis nin, 250 personojn en unu barakon. Nian peton, ke oni donu kune la inteligentularon oni ne atentis. La fenestrojn ni ne devis malfermi, ĉar estis forta malvarmo. Post iom da tempo oni aldonis al ni virinojn. Antaŭ infanoj okazadis teruraj aferoj. Post ĉiu barako estis fosaĵo 1½ m. profunda, 20 m longa kaj ¾ m larĝa. Laŭlonge estis trabo, sur kiun oni sidigadis en malvarmo, en neĝo kaj frostoj. Tiuj »necesejoj« ne estis ŝirmitaj nek de supre, nek de la flankoj. Kaj apud tiuj necesejoj estis nia promenejo. Unu tagon, kiam en la 4. barako oni havis hejman areston, ili povis iradi en tiun necesejon nur po 30 personoj en akompano de soldatoj. Kiam ili sidigis sur la trabon, ĝi rompiĝis kaj preskaŭ ĉiuj falis en la fosaĵon. Purigi sin ili devis ĝis en la barako.

Komandanto de la stacio estis Oberst Albin von Stadler, kiu ne nomis nin alie ol: Hunde, Schweine, Gauner ktp. Al la soldatoj li ordonis nenium trakti indulge, neniu devis paroli kun ni kaj kiu ne obeis, estis mortpafita. Kiu el la soldatoj ne estis

sufiĉe »stramm« tiu estis malliberigita por kelkaj tagoj. Ĉefe Germanoj estis preskaŭ furiozaj kaj per kolboj de siaj pafiloj ili batmartigis multajn homojn.

Komence de decembro 1914 aperis en nia barako tifo, el malsato kaj pro malvarmo. Manĝoj estis nesufiĉaj. Kiu ne havis monon, tiu devis morti pro malsato. La kuracistoj ne zorgis pri ni, precipe dr. Mayer taktis kun ni kvazaŭ kun brutaro. La tifo rapide vastiĝis. La kvinan tagon estis jam 45 malsanuloj, kiuj ne estis de ni izolitaj.

Poste oni donis nin en novajn ne finitajn barakojn. En la alian parton de la sama barako oni forportis la malsanulojn. Eĉ pajlon oni ne havis por ili, kaj tial ili devis kuŝi sur nudaj tabulaj litoj. Anstataŭ kuracilojn la malsanuloj ricevis batojn, eĉ akvon oni ne donis al ili. La gardistoj ŝtelis al la malsanuloj monon eĉ ĉion valoran. Al unu el ili oni elrompis liajn orajn dentojn — kaj li poste saniĝis. Aŭ oni elportis la mortinton antaŭ la barakon, kie ni promenis. Mi estis atestanto, kiam tia ŝajne malviva persono je la naŭa vespere leviĝis, prenis la kovrilon kaj revenis en la barakon.

Ĉiutage mortadis 30—40 homoj. Veturilon aŭ glitveturilon oni ŝarĝis per 20—25 ĉerkoj kaj tiun malgajigan ŝarĝon tiris 20—30 personoj, anstataŭ ĉevaloj. La mortintojn oni enterigis nudaj. En Thallerhof mortis 1200 personoj pro infektaj malsanoj.

Inter la internigitoj estis infanoj de plej juna aĝo ĝis al maljunuloj, kaj homoj de ĉiuj societoj. Jen estis freneziĝinta paroĥestro, kiun mokis infanoj kaj li mokis oficirojn. Tamen li ne estis forprenita de ni. Iam li sidiĝis apud la barako, senvestigis sin ĝis plena nudeco kaj purigis sin de pedikoj. La infanoj mokis lin kaj li kuradis post ili.

Daŭrigo.

ooo

JUDro Josef Fousek:

### LEĜDONADO EN ĈEĤOSLOVAKIO.

Oni diras, ke la vivo de la nacioj speguliĝas en la leĝoj. Mi do ĉi sube donas per ĉefaj trajtoj la koncernan bildon de la ĉeĥoslovaka nacio de post la proklamo de la memstareco. La unua leĝo proklamita samtempe kun la fama »renverso« de 28. oktobro 1918 de la »Nacia komitato« estis publikita la saman tagon. Ĝi destinas laŭvorte: »La memstara ĉeĥoslovaka ŝtato ekvivis. Por konservi la kontinuecon de la ĝisnuna jura ordo kun la nova situacio, ke ne devu konfuzoj kaj por reguligi la

transiron al nova ŝtata vivo, la Nacia komitato, en la nomo de ĉeĥoslovaka nacio, kiel plenumanto de l' ŝtata suvereneco ordonas la jenon:

I. La ŝtatan formon de Ĉeĥoslovakio destinas la Nacia Parlamento en interkonsento kun la Ĉeĥoslovaka Nacia Konsilantaro en Parizo. Organo de la unuanima volo de la nacio kaj ankaŭ plenumanto de l' ŝtata suvereneco estas la Nacia komitato.

II. Ĉiuj ĝismunaj landaj kaj monarkiaj leĝoj kaj ordonoj retenas dume sian valoron . . .«

Novaj leĝoj kaj ordonoj de la registaro kaj de diversaj ministerioj atingis en la ĉeĥoslovaka respubliko ankoraŭ en la jaro 1918 la nombron 103, dum la jaro 1919 preskaŭ 700. Citindaj estas leĝoj, respektive ordonoj: 1. Pri la ekokupo (anekso) de grandbieno t. j. bienoj super 250 ha, kiuj estas proklamitaj »res extra commercium«; la posendatoj ne devas ilin vendi eĉ ne per ŝuldoj aŭ alimaniere ŝarĝigi. Tiu ĉi leĝo estas ankoraŭ kompletigota per aliaj, per kiuj la grandbieno (fideicommissum, latifundium) estas dividotaj. 2. Pri forigo de nobeleco, ordonoj kaj titoloj donitaj kiel honorigo. 3. Pri subteno de laboristoj en kazo de senokupeco. 4. Pri okhora labortempo. 5. Pri anekso de la loĝejoj per la komunumoj — pro grandega ĝenerala manko de la loĝejoj. 6. Pri la fondo de la dua universitato en Brno (Brünn) Moravio (la unua estas en Praha, fondita j. 1348 de l' reĝo Karolo IV.). 7. Pri protekto de luantoj: la domposedanto ne povas ilin malluigi sen grava kaŭzo kaj juĝeja konsento. 8. Pri balotordo en la komunumoj, laŭ proporcia reprezentado de politikaj aŭ aliaj partioj (sistemoj de Hagenbach kaj D'Hondt iom reformitaj, plibonigita svisa sistemo). 9. Pri konskribo de la havaĵo (movebla, nmovebla, valoraj paperoj, militaj pruntoj ktp.) por impostaj celoj. 10. Pri malbonuzo de la predikejoj por politikaj paroladoj. 11. Pri fakultativa forbruligado de mortintoj en krematorioj. 12. Pri popolaj juĝejoj prejaz (kontraŭ akaparo) kaj pri specialaj akaparaj juĝejoj. 13. Pri edzeca divido kaj eksigo, pri fakultativa civiledziĝo kaj forigo de multaj maljustaj edziĝmalhelpiloj (promeso de pureco, diverseco de konfesoj ekz. kristano ne povis edziĝi kun nekristano ktp.), forigo de l' influo de religianeco (ekz. katolikoj ne

povis eksigi sian edzecon eĉ pro plej gravaj kaŭzoj). 14. Pri la fondo de la tria universitato en Bratislava (Pressburg, Pozsony), Slovakio. 15. Pri deviga vakcinado kontraŭ variolo. 16. Pri infana laboro. 17. Pri publikaj bibliotekoj (vidu no 10. de »La Progreso« 1919). 18. Pri ŝtata protekto de sistema elektrizado. 19. Pri milita al-pago al direktaj impostoj. 20. Pri »bohembra eklezio evangelia« fondita de la anoj de evangeliaj kristanaj eklezioj de aŭgsburga kaj helveta konfesoj.

oooo

### VEKRIO\*)

el regiono de Těšín.

Al homaro ni plendas la sorton, kiu Poloj kaŭzis al duklando Těšína. Tiu ĉi apartenas al lando de krono Skt. Václava seninterrompe de jaro 1335. La loĝantaro parolas la dialekton silezian »po našemu« (laŭ nia lingvo), kiu estas multe pli parenca al lingvo ĉeĥa, ol al pola; nur la akcento estas pola. Oni pace kunvivis, ĝis ekestis la intereso de Aŭstrio, gajni Polojn kontraŭ la slava plimulto. Por tio la Poloj ricevis superecon je Ukrainianoj en Galicio kaj Bukovino kaj je Ĉeĥoj en Těšínio. Oni poligis preĝejojn, lernejojn kaj oficejojn per helpo de arestado kaj de bajonetoj. En la industria distriktoj oni migrigis amasojn da polaj laboristoj, kiuj trovis ne nur favoron kaj panon, sed ankaŭ gastemon. Tial ili tie ĉi edziĝis kaj fondis novan hejmon. Samtempe kontraŭĉeĥaj gazetoj senpune vastigis malnoblaĵojn. Tial ne estas mirinde, ke pli malklera parto de loĝantaro en sia opinio ekŝanceliĝis. La aŭstria intenco iom post iom sukcesadis kaj la Poloj ne pripensis, ke post falo de la Ĉeĥoj, kiuj miljaron kontraŭstaras la germanigajn ondegojn, la nacio Pola estos perdita.

La Poloj blinde servutis al Vieno, kaj jam antaŭ la mondmilito preparis legiojn kontraŭ Rusio. Dum la mondmilito ili fervoris nin denunci kaj ekzekuti kaj ili ne hontis preni la »memstarecon« el sangaj manoj de germana kaj aŭstria

\*) Kvankam ni ne konsentas kun la tono, en kiu estas skribita tiu ĉi artikolo, ni tamen enpresas ĝin, ĉar ĝi klare montras la nunan situacion en la plebiscita regiono de Těšín (Tienczin — Teschen), de kie ĝi estis al ni sendita. — Vidu ankaŭ la ĉefartikolon en la 8.—9. no. de La Progreso. La redakcio.

regnestroj. Kaj kiam ni rompintis tricent-jarajn aŭstriajn katenojn, la Poloj okupis dis nian sendefendan landon. Verŝajne il volis la imperion kaj nin humiligi. Al Poloj intencis, nin dum niaj liberigaj bataloj senlandigi kaj de sia favoro dependigi. Tial ni devas miri, ke nia ĉeĥoslovaka respubliko kun tia estimo ka indulgo kun Poloj agadas. La pola plimulto opinias indulgon esti malforteco kaj nin limulojn tiom pli atakas kaj niajn aferojn ĉieble domaĝas. Milionojn perdas nia respubliko per pola monfalsado kaj per ĉiuspecaj nebonaj negocoj. Kontraŭe la Ĉeĥoj estas senkaŭze de polaj militistoj arestataj kaj batataj. Laŭ la decido de Entento estos niaj turmentoj finitaj per voĉdonado. Ni demandas: kiu rajtas pri nia lando lasi voĉdoni? Ĉu la Entento kontraŭ kiu Poloj dum la tuta milito savage batalis, opinias esti prave, ke Poloj ne devu ĉeĥan landon por la servoj al Aŭstrio faritaj? - Do estos voĉdonado. La Pola antaŭvidas finon kaj devigas ĉiun, al Poloj certigi sian voĉon. Ĉeĥajn homojn oni la statempe mortigas. Tiel en Porembe estis per hakilo mortigita kaj en amaso de fajraj cindro entombita laboristo Kořfnek de Alpina minejo. Li estis trankvila, neniam politikema viro, patro de sep malgranda infanoj, kies sola peko estis, ke lin naskis ĉeĥa patrino. Nun ree, dum teatra ekzekutado, oni mortpikis ĉeĥan instruiston en Dětmarovice, sinjoron Majvald.

Kaj nia estraro agadas en gantoj, dum malkleraj polaj elementoj mortigas. Kio utilas la deklaro, ke pola estraro bedaŭras? Tio ne revivigas la oferojn de pola malamo kaj ne redonas patrojn al familioj. Ĉu ni mem devas ekpreni garantiojn?

Netolereblaj kaj neelparoleblaj estas niaj suferoj, tial ni turniĝas al plej alta tribunalo, al homaro, kun peto: forigu el nia Těšína duklando la usurpulojn kaj helpu remoraligi, kion la sovaĝo ruinis.

oooo

Niaj fremdlandaj amikoj ligos nin al dankemo, se ili sendos al ni **notojn kaj raportojn pri Ĉeĥoslovakio**, kiujn enpresas iliaj naciaj gazetoj. La redakcio.

**Ne forgesu reboni!**



## EL FREMDLANDO.

**Italio. La balotoj de la deputataro**, kiuj okazis la 16an de novembro pruvis la indiferentecon de la burĝaj klasoj je la politika vivo de sia patrujo. Oni devas konstati ke el la ĉefaj partioj luktantaj: la socialista, la popola (tiel estas nomita nova partio, kies programo ne multe klara vidigas celojn iom pli religiajn ol politikajn), la militinta (partio de la militintoj, havanta grandajn celojn de reformoj kaj valorigado de la venko), kaj la liberal-demokrata (la plej multenombra kaj klerula, sed ofte dividata en apartaj kandidatlistoj, favoraj aŭ kontraŭaj al la nuntempa registaro), nur la antaŭaj tri iris firme kaj kompakte al voĉdonado, de la lasta, pro la dividoj kiuj ĝin suferigis kaj la eksterordinara sindetenemo de la plejmulto, nur 20% de la anoj voĉdonis; tio kaŭzis gravan venkon de la socialistoj, kiuj gajnis grandan nombron da deputatoj, kaj de la popolistoj, kiuj kvankam ĝis organizitaj, tre persiste luktadis; la militintoj pro malmulteco de anoj ne multe sukcesis. Oni povas konstati ke la itala deputataro preskaŭ tute reneviĝis, ĉar nur kvarono de la eksdeputatoj rehavos sian oficon.

**Gravaj financaj reformoj estos baldaŭ farataj**, por malpligrandigi la deficitajn de la Itala budĝeto. Ili konsideros memvolan prunton de la riĉuloj al la regno, pligrandigon de la impostoj je la dummilitaj profitoj kaj la grandaj posedadoj, k. t. p. — Oni rajte esperas ke tiuj reformoj utilis por altigi la kurzdiferencojn rilate je tiu de aliaj landoj, kaj por pagi la ŝuldojn faritajn de la registaroj dum la milito.

**Ministra projekto pri la duagrada lernejoj**, ĝis aperis. Ĝi pritraktas gravajn ŝanĝojn faritajn en la programoj de ĉiuj duagrada lernejoj; ĝenerale oni konsideras tiun novaĵon necesan reformo, ĉar multaj el la programoj, kiuj delonge valoris, estis tro antikvaj kaj ne konformaj je la novaj vivpostuloj. — Nun oni anstataŭas la pezan instruadon por nuraj reguloj, kiu alportis preskaŭ nenium profiton, por eksperimenta kaj praktika instruado, kiu interesante la lernantojn instruas ilin. Ankaŭ aperis nova dekreto pri la lernajaj promocioj kaj licencoj. Nicola Jäger, Pisa.

**Kanado.** En ĉi tiu monato afero politike la plej grava estas la balotoj en Ontario por la provinca parlamento. Dum la lastaj dek kvin jaroj la »Konservativuloj« okupis la administrajn, sed nune la »Farmista partio« kaptis la plimulton da lokoj kaj kun helpo de »Laborista Partio« ĝi administras la aferojn de la provinco. La partio farmista (Unigitaj Farmistoj de Ontario) formiĝis antaŭ kvin jaroj kaj nun la popolo decidis, ke ili montru, ĉu ili estas pli bonaj administristoj ol la malnovaj partioj, kiuj perdis la konfidon de la popolo dum la milito.

La vizito de la Princo de Kimrujo estas sukceso kaj li kaptis la korojn de ĉiuj kanadanoj. La ŝtata registaro decidis aĉeti la fervojan sistemon »Grand Trunk« kaj doni ĝin al la nuna ŝtata fervojo, kvankam la plimulto da ĵurnaloj kontraŭstaris.

La striko de ministoj en Usono ankaŭ koncercas Kanadon, ĉar ni de tie ricevas la plej grandan parton de nia karbo kaj oni havas malbonan vintron sen karbo. Por hejti la domojn oni havas sufiĉan karbon, sed grandaj fabrikejoj ne povis sin provizi sufiĉe por la tuta vintro. Ŝajnas, ke dum la milito la administraro ĉe Vaŝingtono promesis plibonigi la vivkondiĉojn de la ministoj, sed ne plenumis sian promeson. Nun la »posendantoj« ne parolos kun la laboristoj pri salajroj, ĉar la administraro eltiris dummilitan leĝon kaj ordonis la oficistojn de la »Minista Unuiĝo« haltigi la strikon. La oficistoj obeis, sed ili ne povis devigi la ministojn reiri en la minejojn. La administraro ordonis, ke la posedantoj pagu al la ministoj 14% pligrandigon de salajroj, sed la ministoj postulas ankaŭ malpli longan labordaŭron — 30 horojn semajne. La administraro de Usono protektas per soldatoj la ministojn, kiuj decidis labori.

Dum novembro Kanado prunteprenis de siaj enloĝantoj 600 milionojn da dolaroj. Oni postulis 300 milionojn, sed la prunto pagos 5 1/2%, tial ĉiuj deziris posedi ŝuldateston. Tiu ĉi mono estas necesa por pagi milit-ŝuldojn kaj ankaŭ helpi la nov-eŭropajn ŝtatojn aĉeti niajn komercaĵojn. T. A. Allan, Montreal.

## KULTURO

**Fremdvortoj en la japana lingvo.** Mi ne estas filologo, sed mi havas multe da intereso por studo de la lingvoj, kaj tial mi nun kolektas fremdvortojn en mia patruja lingvo japana. Mia nuna studo estas nur privataĵo, sed mi esperas, ke ĝi estas interesa ankaŭ por alilandaj samideanoj kaj tial mi nun intencas tute mallonge skribi pri tio. En la nuna japana interparolo ni uzas multajn fremdvortojn devenintajn ne nur de ĝina kaj korea lingvoj, sed ankaŭ de kelkaj lingvoj eŭropaj, sekve inter ili estas kelkaj vortoj, kiuj perdis sian karakterizon pro longedaŭra uzado en Japanujo, akordinte al japana vortofarado. K. e.: Furanketo (angle, blanket), lankovrilo. Sacu (angle, shirt), ĉemizo. Botan (angle, button), butono. Manto (france, manteau), mantelo. Bakecu (angle, bucket), sitelo, k. t. p. Krom la suprecititaj fremdvortoj, multaj vortoj de portugala, hispana kaj nederlanda lingvoj estas tute japanigitaj en la jena maniero: Antaŭ alveno de la eŭropanoj, en la 16 jarcento (proksimume 1542 p. K.), venis al Japanujo Portugaloj kaj ankriĝis en la haveno Nagasaki. De post dua alveno al Nagasaki (1571) ili komencis komerci kun Japanoj. Poste, en la jaro 1609, nederlandaj ŝipej alvenis al Nagasaki, kie ili fondis komercejojn kaj fojron, tiamaniere iliaj lingvoj ofte intermiksinte kun la japana, estas uzitaj de ni ĝis hodiaŭ. Do, mi ankaŭ montras kelkajn fremdvortojn en la japana lingvo, devenitaj de la hispana, portugala kaj nederlanda lingvoj: 1. Bateren (pastro). Deveno: portugale, padre. 2. Iruman (vicpastro). Deveno: portugale, irmao (irman). 3. Kiriŝitan (kristano). Deveno: portugale, christao (kristano). 4. Sin-njoro (sinjoro, riĉulo). Deveno:

portugale, senhor (senjor). 5. Madorosu (ŝipano, maristo). Deveno: nederlande, matroos (matros). 6. Araki (distilita alkoholo). Deveno: nederlande, arak. 7. Ĉinta (ruĝa vino). Deveno: portugale, vinho tinto (vinju ĉintu). 8. Pan (pano). Deveno: Portugale pao (pan). 9. Tabako (tabako). Deveno: tabaco (tabako). 10. Orugoru (gurdo). Deveno: nederlande, orgel (crhel). 11. Sabon. aŭ sabon (sapo). Deveno: hispane, jabon (habon). 12. Karakun (melegro). Deveno: nederlande, kalkoen (kalkun). — Tiuj ĉi estas nur malgiantaj ekzemploj, ĉar ni nun uzas ĉirkaŭ 300 fremdvortojn, kvankam nun anstataŭ la fremdvortoj devenintaj de hispana, portugala kaj nederlanda lingvoj ni uzas ĝenerale vortojn de angla deveno.

Aitaro Yamanoi, Tokio.

**Nova kronologio — jaro unua.** La fama angla komentariisto de la dramoj de Shakespeare kaj iliaj dramverkistoj de la Elizabeta periodo faras interesan kaj konsiderindan proponon. Li sugestias ke la mondo nun devas komenci novan tempo-kalkulon kaj la jaro 1919 devas esti la Jaro unu. Inter la diversaj argumentoj por subteni sian sugestion, li skribas jene: »Kronologio difinas la ordon kaj sinsekvon de okazintaĵoj en la historio de la mondo. La Hebrea kalendaro estas la plej antikva el la nun ekzistantaj. La Romana aŭ Juliana epoko fariĝis ne plu uzata en Eŭropo je ĉirkaŭ la sesa jarcento p. K. Ĉirkaŭ 530 jaroj post la naskiĝo de Kristo la romana abato Dionisiŭs aldonis al la kristanaj jaroj la vortojn »Anno domini«. Nova kronologio estas nun necesa por daŭrmemorigi la grandan mondmiliton, kiun batalis ĉiu popolo el ĉiu lando kaj de ĉiuj religioj por establi daŭran pacon inter la nacioj. Tiu, kiu nur fariĝis ebla, post la volonta ofero de milionoj da homaj vivoj. Ĉe la sunsubiro kaj en la mateno ni memoros ilin.« — Interesuloj ricevos pluan informon ĉe So. W. Poel, 5, Amersham Road, London. Putney, S. W. 15, Anglujo.

J. D. Applebaum, Liverpool.

## DIVERSAĴOJ

**Komuna Komitato de Boh. Esp.** kunvenis en Praha (Kafejo »Union«) la 5. jan. Ĉeestis f-ino. J. Šupichová, s-oj. Hromada, Dr. Kamařyt, Pitlik, Pech kaj Tittl. Kiel gastoj ĉeestis s-oj. Bolutinský, Bouška kaj Kraus. Post vigla diskuto oni decidis aranĝi la konstituantan ĝeneralan kunvenon de la fodata centra asocio, prezenti ĝiajn statutojn al la registara aprobo kaj sur la ĉefa loko de »La Progreso« enpresii proklamon al la ĉeĥoslovaka esperantistaro. Egale viglan diskuton vekis la skribe prezentita propono de so. Tittl pri la invito de la XIII. Universala kongreso de Esp. en 1921 al Praha. Konsiderinte la grandan favoron de niaj registaraj rondoj al Esperanto, la nombrecon de ĉeĥoslovaka esperantistaro kaj la valutajn kondiĉojn de Ĉeĥoslovakio, kiuj permesas al fremdulo vivi tie ĉi eksterordinare malkare, eĉ la belecon de Praha, la ĉefurbo de la renaskiĝinta libera ŝtato, kiu certe jam per si mem allogos multajn fremdulojn, la komitato de

cidis entrepreni la necesajn laborojn por efektiviĝi ĉi tiun proponon. Krom tio oni traktis kelkaj punktoj rilatantaj la movadon, kiuj pro kelkaj motivoj oni ankoraŭ ne povas publikigi.

**Konkurso.** Esperantista Klubo en Praha anoncas konkurson je esperantlingva pritrakto de politikaj kaj ekonomiaj rilatoj de Ĉeĥoslovakio. La elekto kaj prilaboro de la materialo estu gvidata per la tendenco prezenti pozitivajn informojn, kiuj povas servi al fremdulo. La verketon oni juĝos ĉefe laŭ ĝia enhavo, sed eĉ la lingva flanko ne restos sen atento. La verketon signitan per devizo kaj akompanata per fermita koverto enhavanta adreson de la aŭtoro oni sendu al so. R. Hromada, Praha II. Sochařská 333. — Tempolimo: 31. januaro 1920. Amplekso: 4—9 folioj. Premioj Kĉ 70.—, 50.— kaj 30.—.

**Geinstruistoj, samideanoj!** Ĉu vi volas partopreni en nia entrepreno? Ĉe instruista distrikta societo en Olomouc estis starigita Kultur-pedagogia fako kun rondetoj por diversaj fakoj: naturscienco, desegnado, kaj manaj laboroj infanaj. La fako por desegnado kaj manlaboroj serĉas seriozajn gekolegajn prefero el fremdlando, kiuj volus interŝanĝi kun ni per esperanto artajn produktaĵojn infanajn. Mi gvidas esperant. kurson kun 35 gelnatoj de burĝa lernejo en Olomouc, kiu preparas nuntempe precipe desegnaĵojn per interŝanĝado. Mi mem laboras laŭ propra metodo manpresitajn ornamaĵojn per lignaj tipoj — tre interesa laboro! Kiu ne povas sendi belajn desegnaĵojn, tiu povas sendi naturaĵojn por kolektoj, bildojn aŭ ludilojn por instruado per bildaro. Sole seriozaj gekolegaj bonvolu sin turni al Sro. Neuzil Albin, lernejestro Olomouc-Nefedin, Ĉeĥoslovakio. Fremdlandaj gazetoj bonvolu represii.

**Interblindula propagando.** Esperanta lernolibro per bohemiaj blinduloj eldonata pokaŭ jere aperis jam tute. Ĝi estas aranĝita laŭ ĉi tiu lernolibro de f-ino Julie Šupichová. — »Esperanta Ligilo«, unusola esperanta gazeto por blinduloj-esperantistoj eliranta en Stockholm, reaperos en januaro 1920. Ĝian daŭran eldonadon ebligis Sir Artur Pearson, direktoro de »Nacia Instituto de blinduloj« en Londono sukcesinte instigi la Instituton, ke ĝi pagu al redaktoro de »E. L.«, Sr. Harald Thilander en Stockholm, ĉiujare 250 sterl. funtojn (ĉirkaŭe 6000 frankojn) por eldonado de »E. L.« Sekve de tiu-ĉi granda monsubteno oni malaltigis la abonpagon tiom, ke ekzemple germanaj blinduloj pagas sole 2 M 50 pf. kaj ĉeĥoslovakaj blindaj abonantoj sole 3 ĉeĥoslovakaj kronojn jare. Fine interesiga estas eble ankaŭ ke mi, dank'al monkolekto aranĝita de multnombraj ĉeestintoj de Macan-a vespereto en Pardubice, disponas tiutempe per sumo 730 Kč 21 hel. uzota al porblindulaj presentprezencoj. Stanislav Stejskal.

**Boĥna laboro per Esperante.** La distrikta urbo Holešov en Moravio (Ĉeĥoslovakio) fariĝas grava punkto de serioza movado kaj laboreporesperanta. Antaŭ ne longe okazis tie publika kurso esperanta (Fino, Janalĥková) kaj nun

okazas faktoj ankoraŭ pli gravaj kaj tre utilaj por nia movado: la prezidanto de komercista gremio s-o Ferd. Hluštík igis gremion enkonduki Esperanton kiel devigan objekton en la instruajn planojn de gremia lernejo por komercistaj lernantoj. En la komercista lernejo instruas Esperanton la bone konata esperantisto Josef Krumpholtz, lernejdirektoro el Hlinsko p. II. — La dua ĝojiga fakto estas enkonduko de Esperanto en la ĵus fonditan IV-an klason de duagrada (burĝa) lernejo, kie instruas Esperanton kun bonega sukceso s-ro Karel Loveček, kiu mem eklernis Esperanton nur antaŭ ne multaj monatoj. Jen, amikoj, bonegaj ekzemploj kiel propagandi Esperanton plej sukcese. Ni laboru kaj esperu! Th. Ĉ.

**Alvoko al la Skoltoj.** Ĉiuj eksterlandaj skoltoj-esp., kiuj deziras korespondi kun ĉeĥoslovakaj skoltoj, bonvolu sciigi sian adreson al so. Aug. Pitlík, oficisto de Fremdula ofico ĉe la Ministerio por Komercio, Praha II., Nerudova 40. (Eksterlandaj esp. gazetoj bonvolu respesi.).

**Leipziga Specimena Foiro** okazos 29. feb. — 5. marto. Ĉiu partoprenanta komercisto-esp. estas petata en la Oficejo de la Foiro paroli unue Esperanton, postuli esperantan liston de la komercaj branĉoj kaj gvidanton parolantan esperante. Li anoncu ankaŭ sian alvenon al la Ŝtata Saksia Esperanto-Instituto, Leipzig, Johanispl. 3. I. kaj skibu al ĝi, ĉu li bezonos helpon dum sia restado en Leipzig. Eĉ la komercistoj, kiuj nun ne alvenos al la Foiro postulu la alsendon de Esperanta listo de la komercaj branĉoj, skribante al: Leipziger Messamt, Leipzig.

**Atentigo.** La artikolo »La supozoj de la daŭra paco« enpresita en nia decembra numero estas tradukaĵo de F-ino Dandová. Sekve ĝi ne estas esp. originalo!

**Ĉiuj Esperantistaj societoj en Ĉeĥoslovakio** bonvolu anonci al nia redakcio siajn adresojn, ĉar ni ilin bezonas por grava propaganda celo!

**Fremdlandoj gazetistoj** laŭdezire ricevos de nia redakcio, aŭ de la »Sekcio por ekonomia kaj politika informado de la Ministerio por eksterlandaj aferoj« tute senpaga **notojn kaj raportojn pri Ĉeĥoslovakio.**

La Progreso.

## „LA PROGRESO“

en la nuna jaro kostas 12.— Kê aŭ 2.—  
Svisajn Frankojn.



La fremdlandanoj abonu ĉe la „Universala Esperanto-Asocio“, Bern, Museumstr. 14.

## KRONIKO

**Praha.** La 12. dec. paroladis so. Aug. Pitlík en la kunveno de Ben Powel-skoltoj pri »Esperanto en la servoj de la skolta korespondado«. Ĉiuvendrede de 7. — 9. h. vespere okazas en la knaba lernejo ĉe Vojtěch, Praha II., kurso por 60 skoltoj kaj iliaj estroj gvidata de so. Pitlík.

**Plzeň.** Esperantista klubo aranĝos sian XV. ĝeneralan kunvenon la 28. feb. La dekkvinjara jubileo de la ekzisto estos festata la 6. marton per festvespero. — En la Popola Universitato komenciĝos nova kurso de Esp. — La urbestro decidis lokumi en la stacidomoj de Plzeň kaj en ĉefaj stratoj de la urbo informajn tabulojn por fremduloj, inter kies diverslingva teksto estos ankaŭ la esperanta.

**Budějovice.** So. instruisto Svačina gvidas du kursojn: por komencantoj kaj por progresintoj.

**Pardubice.** Esperantista rondeto aranĝis la 7. dec. Festvesperon de Macan (komponisto kaj propagandisto de Esp. inter blinduloj), kies programo konsistis el komponaĵoj de nia estiminda samideano.

**Hradec Král.** Inter la soldatoj de la loka garnizono propagandas tre vigle kaj efike Esp. so. J. Adámek, kiu ankaŭ ofte enpresas artikolojn pri Esp. en la soldataj gazetoj.

**Brno.** En la societo de studentoj de Industria lernejo paroladis la 11. dec. so. prof. ing. Kroužil pri Esperanto. — En la Industrio lernejo komenciĝis kurso de Esp., kiun gvidas so. prof. ing. Kroužil. — La 13. jan. estis tie ĉi fondita Esperantista klubo, kiu aranĝos siajn kunvenojn en Akademická kavárna (Falkensteinerova). Sekretario estas so. Jan Šembera, faka instruisto. Kunvenoj ĉiumarde je la 8-a vespere.

**Olomouc.** En Popola Universitato gvidas kurson por progresintoj soj. Kudela kaj Mastný. — Fakinstruistino Mater Klara gvidas du kursojn: por komencantoj kaj por progresintoj en la konvento de Ursulinoj. Multaj partoprenantoj. — En la burĝa lernejo malfermis kurson por 35 lernantoj so. lernejestro Neuzil. La Kurson partoprenas ankaŭ unu lernejestro kaj du fakaj instruistoj. — Manko de karbo kaj lumo malhelpas pli viglan laboron. — Kunvenoj okazas ĉiun duan mardon je la oka vesp. en hotelo Lauer.

**Přívov.** La 20. nov. paroladis tie ĉi so. Bohumír Matějka pri Esp. Samtempe estis fondita »Esperantista Rondeto«.

### DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresado kostas 1.—.)

**Žilina** (Slovakio), Poŝtfako 26. — So. Alois Janza, deziras korespondi precipe kun gestudentoj. Li certe al ĉiu respondos.

**Wiipuri Neitsylniemi** Matinkatu 6, (Finlando) — So. Lauri Salmi, interŝanĝas fotografaĵojn, esp. »ŝlosilojn« kaj gazetojn.

**Chicago, Ill.**, 1041. Milwaukee Ave, (Usono)  
So. W. M. Taben, deziras korespondi pri so-  
ciaj kaj politikaj aferoj, precipe pri la nunaj  
okazintaĵoj.

Fraŭlino el Plzeň, kiu skribis antaŭ kelkaj  
semajnoj al So. Baron Pavel el Rybárpole, bon-  
volu refoje sendi sian adreson, ĉar ŝia karto  
okaze de vojaĝado estis perdita. — Beniček,  
Del. U. E. A.

**KVITANCO**

Sub la devizo »Al helpo« (por so. Bakalář  
Skrbecký) ni ricevis jenajn sumojn: De so. Dr.  
Kamaryt Kč 10.—, de so. inĝ. Kroužil, Brno  
Kč 15.—, de Esp. Rondeto en Pardubice Kč  
50.—, de so. Hector Hodler, dir. de UEA., Bern,  
Kč 25.—. En la nomo de la malsana samideano  
ni esprimas al la donacintoj korajn dankojn!  
La Progreso.

**CIZINECKÝ ÚŘAD  
V PLZNI**

**Fremdula oficejo en Plzeň,  
Strato Fodermayerova 14.**

Donas volonte kaj senpage ĉiujn informojn  
pri Plzeň kaj pri okcidenta parto de Bohemio.  
Deziras ekligi rilatojn kun fremdlandaj Fremdulaj  
oficejoj kaj ŝipkompanioj.

Interŝanĝas gvidlibrojn.

Korespondas: esperante, boheme, france, angle,  
germane, itale, svede kaj hispane.

**ESPERANTA  
FINNLANDO**

nova jarkolekto 1920.

Ilustrata, bonstila, nur Esperanta, monata  
Artikoloj pri Finnlando, pri Esperantismo

Fakoj: Literatura, Koresponda.

Reprezentantoj dezirataj ĉie.

Abonprezo: 1/1 jaro 30 respondkuponoj,  
1/2 jaro 16 respondkuponoj.

Specimenoj senpage ĉe

**Esperanto-Oficejo  
Finnlanda**

Helsinki, Kauppiask 11.

**Eldona akcia societo Otava.**

**Objednejte si slovník  
Esperantsko-český**

u adm. „LA PROGRESO“ v Plzni.  
Cena brož. Kč 4.—, v plátně vázaný Kč 6.80

Se vi deziras havi bonegan internacian gazeton,  
abonu :

**»ESPERANTO«**

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.  
MONATA GAZETO REDAKTATA TUTE EN ESPERANTO.  
16—20 paĝoj de plej bona teksto.

Enhavo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri internaciaj problemoj, soci-  
alaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literatúraĵoj. — Esperan-  
tismo. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Lingvaj studoj.  
— Anoncetoj.

Jara abono: 24— Kč. — Kune kun la membreco de U. E. A. 30— Kč.  
Pageblaj al admin. de „La Progreso“ en Plzeň.

Senpaga **specimeno** laŭ peto de la administrejo:  
**Museumstrasse 14. Bern. (Svisio).**

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská  
Presis: Laborista presejo, Plzeň.